

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII, SOCHAŤSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.--; fremdlando Kĉ 25.-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Cekoficejo Praha: N-ro 34.271

MEA CULPA

Fabelo rakontas pri granda festeno en reĝa kastelo. En la plej bela el ĉiuj salonoj sidis la reĝa familio kun siaj altrangaj gastoj ĉe riĉa tagmanĝa tablo. Oni festis naŝkiĝtagon de la belega reĝidino. Gajeco bruis... Ĝojon elradiis ĉies okuloj... Tamen venis momento fatala. Malbelega, maljuna sorĉistino venis, diris sian sorĉan formulon kaj ĉiuj en la reĝa kastelo ŝtoniĝis... Pasis jardekoj... Juna, belega reĝido, rajdante tra la bela mondo por kolekti spertojn, transpaŝinte naŭ riverojn, naŭ montegojn kaj naŭ marojn, venis hazarde ankaŭ al la ensorĉita reĝa kastelo, kiu estis preskaŭ kaŝita de la ĝin ĉirkaŭanta kreskajaro. Sed la juna reĝido estis forta junulo, kun ora glavon en la mano li eniris la reĝan kastelon kaj multe ekmiris vidante jen la falontan serviston sur la ŝtuparo, jen la vangofrapontan kuiriston en la kuirejo, jen la trinkontan post toasto societon en la reĝa salonego... Mirigita li rigardis la ŝtoniĝintajn figurojn kaj ekvidinte la belegan reĝidino, li estis tuj kaptita de freneza amo al ŝi... Interkonsiliĝinte kun sia brava ĉevalo, li ekrajdis ĝis al limo de la mondo kaj tie, post kuraĝa batalo kun naukapa drako, li akiris boteleton da viviga akvo, revenis kun ĝi al la ŝtoniĝinta reĝolando, kiun li revivigis per kelkaj gutoj. La falonto falis, la vangofrapo atingis sian celon, la pokaloj estis malplenigitaj, toastoj sekvis „kvazaŭ nenio estis okazinta“! La reĝidino edziniĝis je la reĝido, kiu de la reĝo ricevis duonan reĝnon, ili sin amis reciproke,

ili saĝe regadis kaj se ili ne mortis, ili vivas ĝis nun...

Vizitinte la redakcion de la Progreso mi ekmemoris la supran fabelon. Certe, amiko Hromada ne estas juna, bela reĝidino, nek mi estas juna, bela reĝido. Mi ankaŭ venis per tramo, ne ĉevalo. La „reĝa palaco“ de Hromada konsistas el unu ĉambro, kuirejo kaj antaŭĉambro sur la kvara etaĝo. Ĉio estas tre bela, ĉar ĉio malgranda estas bela! Tamen la loĝejo estas sufiĉe granda por kvarmembra familio, por redakcio de la Progreso, por sekretariejo de CAE, por multaj cirkuleroj kaj aliaj korespondadoj de ICK kaj de UEA! (?) Mi esprimis mian miron pro la fakto, ke Hromada ĉiutage matene forlasas tiom da interesaj aferoj, irante labori en iun alian oficejon. Hromada tre miris, ke mi miras kaj klarigis, ke li ja devas iel perlabori porvivi por si kaj por sia familio...

Sed mi revenu al la ŝtoniĝo! Al la ŝtoniĝo de La Progreso! La aperonta numero estas preskaŭ plenkompostita. Jen multaj folioj de presprovoj, sed jen ankoraŭ mankas tia artikolo, jen mankas alia. Neniu helpas. Ankaŭ abonoj ne abundas. Homoj ŝuldas por 1928 iuj eĉ por 1927 kaj 1926. La redaktoro fariĝis izolulo, liaj pensoj estas grizaj, kiel la ŝtono.

De multaj flankoj aŭdiĝas: „Kio estas kun La Progreso“? „Kion faras Hromada?“, „Kial La Progreso ne aperas?“, ktp. Kiu estas kulpa? Certe ankaŭ amiko Hromada, sed ne nur li, ni ĉiuj! Batale en mian bruston, ankaŭ mi pu-

(Fino sur p. 78)

MARIE UNDER.*)

DUM FLORADO DE SIRINGOJ.

(El la estona Hilda Dresen.)

Petalojn blankajn jam padus' dissemas,
Kaj de siringoj fluas bonodor';
Nun ĉarme disvolviĝis ĉiu flor',
Je arboj bluaj la ĝardeno plenas.

Min sentoj dum sendormaj noktoj
premas:

Fajrere ardas mia ruĝa kor' —
Ho, de siringoj fluas bonodor'!
Sopir' dolora en la koro tremas!

Sed neĉeestas vi — pro kio do belec'
De la violkoloraj floroj estas?
Pro kio somernokta la helec'

Abunde apud mia lito restas?
Turmentas min la belon sola vidi —
Sed ne ĉeestas vi, por ĝin kun mi dividi.

* *

Nun la siringoj kaj ĉerizarboj floras,
Ĝardenon kovras lane-blanka florokron',
En la aero ŝvebas dolĉ-arom',
Tro ebriiĝe la siring' odoras.

Ho, en la floroj droni mi nun volas!
Sur min aromojn ŝutu, florburĝon'!
Senpacience jam la violon'
De la sopiro en la kopo ploras.

Hodiaŭ vivosencon solvi mi ne celas:
Sufiĉos tempo poste dum aŭtun',
Dum vintro kor-sobriĝa kaj malvarma.

Nun tremas mi pro vivoĝoj' alarma.
Ĉerizoflore mia sango ŝvelas,
Freneza koro mia sola regas nun.

*) La du poemoj estas prenitaj el la ĵus aperinta kolekto: „Elektitaj versaĵoj“ de la estona poetino Marie Under, trad. de Hilda Dresen. Eldonis Esperanto-Asocio de Estonio en Tallin, 96 p. 13×17 cm. Prezo 2 sv. fr. (13 Kĉ) plus afranko. Ni rekomendas al la amikoj de poezio.

blike konfesas mian kulpon. Sed tio ne sufiĉas! Mi devas helpi! Kunlabori, skribi, verki, babili, varbi abonantojn, helpi en la administrado, helpi por ke La Progreso reviviĝu, por ke ĝia redaktoro ricevu guston por plua laboro.

La novan numeron akceptu „kvazaŭ nenio estus okazinta“ kaj helpu vi ĉiuj por redoni La Progreson al la nialanda esperanto-movado, kiu nepre bezonas indan gazeton! O. Sklenĉka.

VIKTOR KAM. JEŘÁBEK.

LA KRUĈETO.

En la plej kara anguleto de miaj infanaj rememoroj estas kaŝita kiel en mola kotonen-volvajo la bildo de ĉarma blua kruĉeto. Ĝi ne estis ordinara metiista produkto, sed vera artistaj objekto, tre delikate kaj belguste farita. Ĝi estis groteske malgranda, diketa, kun longa, antaŭen elkuranta buŝeto, ekstere intensive azurblua kun kristalaj, travideblaj, profundigitaj strioj en formo de litero S ĉeflanke, interne neĝe blanka. La tenilo kvazaŭ el glacio estis ĉarme kurbigita kaj ĉirkaŭvolvita per branĉeto kun foliaro.

Ho ĝi estis beleta ludilo, ne, kion mi diras; ludilo! — poemo inter la kruĉetoj! —

Du bonaj feinoj donacis al ni dum la sankta Nikolao malavarajn donacojn. Unu ŝatis fortikecon kaj konsekvence elektadis sukeraĵojn nur ĉe marcipanisto en la konvinko, ke la koloritaj koretoj, ornamitaj soldatoj kaj maldelikate eltranĉitaj pistoloj kaj trumpetoj estos pli nutrigaj ol la frandaĵoj el sukera ŝaŭmo, mizere maldiketaj Linz'aj kuketoj kaj forbloveble malpezaj produktoj el butera pasto de la sukeraĵisto. Per la praktika senco ŝi estis direktata ankaŭ ĉe la elekto de ludiloj kaj tial ŝiaj donacoj estis „ekzistemaj“, al la infana obstineco kaj scivolemo pri la interna aranĝo brave rezistantaj. Ŝiaj radportiloj kaj lignaj bloketoj, keglaro kaj kugletoj dum longaj jaroj gajigis min kaj danke memorigis al mi la saĝan donacanton -- la onklinon Kubátová.

La dua bona feino estis maljuna fraŭlino poŝtovicistino, personeto kaduketa kaj ĉiam kvazaŭ krispigita, en la plej alta grado nervema kaj sekve ekscitigema. Ŝia kapo kun longetaj „tubo-krispoj“ ĉe la oreloj, kun akra volbita nazeto kaj profunde enfalintaj, duone estingitaj okuloj memorigis al mi ĉiam malŝanatan birdeton.

Ŝi certe konis pli bonajn tempojn, en sia junaĝo ŝi estis en fremdlando kaj havis tiukaŭze pli instruitan guston ol la onkino Kubátka, kies vivo pasis plejparte en senfinaj zorgoj kaj laborego.

Ŝiajn delikatajn kaj ĉiam originalajn ludilojn ni havis kutime fermitajn en la ĉambra vazarŝranko kaj nur ĉe specialaj feliĉaj okazoj mi amuzis min per ili. Mi bone memoras gracion, en blankan mantelon envolvititan Beduonon, altareton kun speguleto kaj kronadaj juveloj brilantaj per oro, grandan porcelanan muŝon, kies flugiloj kaj teruriga kapo formis kovrilon,

sub kiu estis kavaĵo por konservi tie etaĵojn...

Kaj same belguste ŝi elektadis ankaŭ sukerajojn de sukerajisto Pecold, majstro super majstroj, eltrovema a tisto precipe rilate al la ornamado de la turoformaj, fabele luksaj edziĝfestaj tortoj. Ŝiaj kolumbinetoj, kronetoj, harpoj, korbetoj estis kvazaŭ el araneajoj teksitaj, per sorĉa elspiro aperintaj kaj vekis en mi jam de nura rigardo pian miregon. Kaj kio nur, kiam degelis en mia buŝo iliaj delikataj gustoj! — Sed la plej bela ŝia donaceto: la azurblua kruĉeto kun blankega, kvazaŭ al kisado loganta buŝeto-verŝilo kaj glaciacia tenilo efektive prisorĉis min. Dum tutaj horoj mi kun neestingiĝanta intereso rigardadis ĝin, mirante pri ĝia azura ventreto, travideblaj strietoj sur ĝi, tra kiuj iam tuta zono de ĉielarkaj koloroj trabriletis, la filigranan foliaron sur la branĉeto volvanta sin ĉirkaŭ la tenilo. Kaj infana fantazio alsorĉis al si en tiaj momentoj tutan fabelan mondon. El ĝia neĝe blanka interno eliradis subtilaj feinoj kun maligitaj haroj kaj verdaj kronetoj, dancis ĉirkaŭ ĝi, petoleme ridetis je mi kaj neesprimeble dolĉe flustris: „El via kruĉeto, knabeto mia, ni trinkigas floretojn en fabela ĝardeneto. Nur tiel la fingretojn ni malsekigas kaj kun guteto da akvo ni rapidas hejmen...“ Alian fojon mi revis, ke la folietoj sur la tenilo ŝanĝiĝis je gnomoj, tiel travideblaj, kvazaŭ ili estus faritaj el la plej pura kristalo. Ili ekkaptis la kruĉeton kaj kuregis kun ĝi, ke estis eble vidi, kiel iliaj koretoj pro la ĝojo saltetas... Mi vekigis el la revado kaj sincere mi bedaŭris, ke la sorĉo malaperis...

La panjo permesadis al mi preni la kruĉeton en la liteton, kie mi metadis ĝin sur la kusenon, la kapon mi alpremetis al ĝi kaj tiel kelkfoje feliĉa ekdormis.

Kiel specialan favoron, post multaj admonoĵoj nur atente konduiti kun ĝi, pruntedonadis ĝin al mi mia panjo iam en la bankuvon, kie mi banis min. Tiam mi plenigis ĝin per akvo kaj reveme mi rigardis la arĝentan fonteton el ĝia elkurinta buŝeto susurantan. Kaj spirite mi aŭdis susuri rivereton tra arbara trankvilejo, mi vidis fabelan reĝon, kiu volante trinki el ĝi estas kaptita je barbo de nikoviro kaj liberlasita nur je promeso, ke li donos tion, pri kio li ne scias en sia hejmo. — Kun penso je tiu ĉi kara ludilo mi enlitiĝadis kaj kun penso je ĝi mi ankaŭ vekigadis.

Kaj okazis foje, ke la kruĉeto dumnokte deglitis de la kuseno, kaj kiam mi ĝin matene korprenite serĉis, mi trovis ĝin sub la

lito, kun forrompita tenilo.

Mi estis pro tiu ĉi malfeliĉo tute senespera, nekonsolebla kaj mi scias nur, ke je ĉiuj konsoloj de mia panjo kaj de servistino mi estis respondanta nur per doloregaj plendoj kaj petegoj: „Forportu ĝin al Karliĉek, ke li riparu la tenilon!“ (Karliĉek estis loka ĉiuseca artisto.)

Ili faris laŭ mia volo, sed Karliĉek ĉagrenite forregalis ilin, ke li „rompitaĵojn ne riparas“.

Mi provis en la infana naiveco mem la feliĉon, salivumis la tenilon, penis alfiksi ĝin per gluaĵo de faruno kaj per gluo, sed vane. Ĉiun tian sensukcesan provon mi priploris per maldolĉaj larmoj.

La kruĉeton oni longe ankoraŭ kaŝadis en la vazarkesto, — eble pro la delikata konsento kun mia doloro, — sed kiam mi estis pli aĝa kaj pro aliaj amuzoj forgesis ĝin, oni utiligis ĝin praktike. Foje, trovinte la manĝaĵoŝrankon en la provizejo malfermita, mi ekvidis ĝin en la supera fako inter aliaj aĵaĉoj. El la travideblaj strietoj sur la ventreto ĝi brilis per oro.

Ĝi subiĝis de la fabela juvelo je simpla oleujo.

Ni paciĝis kun ĝia malgaja sorto kaj sufiĉe ofte eĉ mi mem alportis en ĝi oleon por salato al la panjo, sed eĉ en la nuna mizeriĝo kaj ordinariĝo ĝi estis kara al mi, eĉ se la komenca entuziasmo jam grandparte malaperis. Kiam ajn mi iris serĉi frandaĵojn kaj feliĉe trovis la keston en la provizejo malfermita, ĉiam mi per la unua, kora rigardo salutis ĝin: „Ho, mia kara kruĉeto!“

*

La jaroj pasis kaj kun ili ankaŭ mia senzorga kaj ĝojoplana junaĝo. Hejme mi estadis jam gasto, venante nur por ferioj. La gepatroj ŝanĝis tiutempe la loĝejon kaj transloĝiĝis en alian urban kvartalon. La malnovajn, nebezonaĵn meblojn ili forvendis kaj anstataŭis per pli modernaj. Tiel malaperis ankaŭ la manĝaĵoŝranko kun ĉiuj bonajoj, kiujn nia kara avineto por ni tie konservadis kaj kiel arguso gardadis kontraŭ la infana frandemo kaj arbitreco.

„Kaj kio okazis kun la kruĉeto?“, foje mi incitete demandis en subita rememoro.

„Kiu scias, kie ĝia fino estas!“, kvazaŭ en pensoj ekĝemis la servistino Marjanka. Mia koro tiumomente premiĝis kaj maldolĉo plenigis mian buŝon.

„Kiu scias, kie ĝia fino estas!“

„Kion Vi scias, kion signifis por mi la azura kruĉeto!“ malgaje mi diris al mi spirite.

*

Kaj denove forflugis vico da jaroj.

Tiam la unuaj arĝentfadenoj ekbrilis jam sur miaj tempioj.

Mi vizitis mian naskiĝurbon kaj trovis la naskiĝodomon interne tute ŝanĝita, ja kion mi diras: ŝanĝita! malbeligita, profanita!

„La industrio“ disrampis kvazaŭ kancero en ĝia, iam tiom intima korteto kaj misteraj magazenoj, sur la lumaj balkonetoj, kie iam tumultis infanaro; per la plenena rapidego kaj surdiga bruego ĝi profanigis la idilian trankvilon de la estintaj sanktejoj de familia feliĉo... Kie iam estis kaŭranta nia poezia ĝardeneto kun la rozo „Malmaison“ estis amasigitaj nun kestoj kaj sakoĵoj...

Ne, ĉi tie ne estis eble halti. Mi turnis min sur kalkano meze de la korto kaj kun premitaj dentoj mi rapidis de ĉi tie.

La domposedanto post mi. Li volis fanfaroni ankoraŭ per la laborejoj, moderna magazeno, sed min ĉio pelis de tie...

Sufiĉe mi vidis ĉe la unua ekrigardo! Nur en la halo mi profunde elspiris, kvazaŭ mi estus el peza malbela sonĝo vekiginta.

„Eble interesos vin, kion ni trovis en la niĉo sur la balkono“ en la supozo de mia dolora humoro promese rimarkigis la domposedanto kuratinginta min jam ĉe la domelirejo.

„Estas ja nur rompaĵo, sed maljuna Marjanka tiom petegis, ke mi konservu ĝin.“

Surprizita mi ekrigardis la domposedanton kaj senkonscie eniris kun li la vendejon.

„Kiel mi diras, ĝi estas nur rompaĵo, ni trovis ĝin inter la neuzebla aĵaĉaro, sed se ĝi ĝojigos vin...“

Antaŭ miaj okuloj aperis la azura kruĉeto, sed en kia malgajega stato!

Ĉirkaŭe forbatita, la azuro griziĝinta de la polvo kaj malpuraĵo kaj la eteta, al kisado loganta buŝeto mankis.

Per tremanta mano mi ekkaptis ĝin al la brusto kvazaŭ matenan rememoron je la suna infanaĝo kaj apenaŭ subpremante larmojn, mi elkuris el la vendejo.

Ĉiuj kordoj de mia koro sonis malĝojplene: „Kio restis el vi, mia ĉarma kunulo de mia juneco, kio restis el vi...!“

Tradukis B. Vlčeková.

G. F. NICOLAI:

PROBLEMO DE RASOJ.

La problemoj de la rasoj estas unu el la plej malĝojaj problemoj de la homa scienco, ĉar nenie oni tiom senĝene starigis la „senantaŭjuĝan“ sciencan servon de politikaj celadoj: la libroj de Anglo-germano Houston-Steward Chamberlain estas por tio ekzemplo. Kiel oni scias, provis tiu ĉi aŭtoro reklamaci ĉiujn eminentajn homojn de la mondhistorio — inkluzive Kristo kaj Dante — por la germana raso.

Sed se ni pripensas la bazon, sur kiu tiuj rasaj teorioj staras, ni trovas ilin tre malfortaj.

1. Generale ne estas pruvite, ke iu pura raso estas pli bona ol ia raso miksitaj.

2. Detale estas nepoveble difini, kio estas la homa raso.

Koncerne valoron de ia pura raso oni diras, ke purrasa hundo estas pli valora ol iu strat-hundo. Kaj el tiu fakto sekvis mirinda opinio, ke purrasa homo estas pli valora ol la miksrasa.

Ĉe la hundoj, kaj en malpli granda nombro ankaŭ ĉe aliaj hejmaj bestoj, estas tiu ĉi ŝatado komprenebla; ĉar la homo edukis el la origina hunda raso tion, kion li bezonis aŭ kio al li plaĉis. Tiel li edukis malaltan kaj longan rason kun kurbaj, por fosado taŭgaj, piedoj, kuraĝan, fortan kaj rabeman — la melhundon, kiun li uzadis por ĉasi la bestojn loĝantajn en truoj. Alian rason li edukis granda kaj maldika, longpieda — la rapidhundon, kiu ĉasus por li leporojn, kaj simile ĝi edukis por si atentemajn ŝpicojn, bonnazajn halthundojn, laŭ la viro dresitajn dogojn kaj sanktbernardajn hundojn por savado de homoj.

Ĉiuj tiuj rasoj havas sole tute certajn kvalitojn, dum la ceteraj kvalitoj estas malgrandigitaj: tiel la rapidhundo ne povas flari, la melhundo ne scias obei, la dogoj ne estas mordemaj. Mallonge dirite: tiuj purrasaj hundoj ne estas biologie iele escepte talentitaj, sed la homo volas ilin havi tiajn, kaj tial ŝajnas al li la miksrasaj hundoj, ĉe kiuj estas la purrasaj specialecoj forviŝitaj, malpli valoraj.

Sed ke la purrasaj hundoj estas laŭ la pure biologia vidmaniero malplivaloraj, sekvas jam el tio, ke precipe la plej bone finbreditaj elmortas plej ofte relative baldaŭ; ekzemple sanktbernardaj hundoj travivis sole kvar generaciojn, kaj ankaŭ la puraj mopsoj ne ekzistas plu, sed en iliajn lokojn venas aliaj

„puraj“ rasoj.

Rimarkinde ankaŭ estas, ke la polichundoj, kiuj laŭ sia destino devas esti „multmaniere“ uzataj, ne estas nomataj purrasaj.

Purajn rasojn oni povas uzi sole tiam, kiam oni celas specialan celon, kaj ĉar oni uzas la hundon por tiom diversaj, al ĝia naturo fremdaj, celoj, tial la ideo de la pura raso havas speciale ĉe la hundo signifon kaj valoron.

Ĉe aliaj civilizbestoj — (ĉevaloj, bovoj, kaproj, porkoj ktp.) estas artefarita mikrado, do plibonigado, kiel diras la bredistoj, la ĉefafero. Kaj eĉ ĉe tio, se oni bredas rason iom puran, oni estas devigita refreŝigi la sangon de tempo al tempo. Sole la ĉevaloj bredataj por sporto kaj kelkaj kolombrasoj por plezuro estas esceptoj, sed kiel laborĉevalo estas uzebla sole la „duonsanga“ ĉevalo.

Inter bestaro do ni ne trovas argumenton por la frazo, ke la purrasaj nacioj estas pli valoraj, kaj inter homoj tian argumenton ni tute ne povas trovi, ĉar inter ili tute ne estas iaj puraj rasoj — ne atentante eble kelkajn tre malsupre starantajn naciojn. En Eŭropo formas ĉiuj nacioj nacian haoson.

Sed eĉ se oni dirus: Nu, la nacioj estiĝis siatempe per mikrado, sed nun formiĝis per tiu mikrado en daŭro de tempo unu unueca raso, kaj tiaj malnovaj rasoj estas pli valoraj ol la junaj miksaĵoj, tamen eĉ ne kun tio konsentas la faktoj. Kontraŭe, estas atentinda la fenomeno, ke ĉiuj nacioj, kiuj estiĝis grandaj, rakontas en siaj mitoj, ke ili venis en sian nunan landon kiel konkerantoj; tio estas sendube rememoraĵo pri la fakto ĉiam denove pruvata, ke la potencaj nacioj, kiuj povas doni ion novan al la mondo, estiĝas ĉiam tie, kie du naciaj fluoj kuniĝas kaj nova regno ekestiĝas. Tio taŭgas ankaŭ por la antikvaj regnoj de oriento, sed por resti sole en Eŭropo, el la granda movado nomata Dora migrado kaj greka koloniado rezultis Helenaro kaj Roma (Roma mondimperio ankoraŭ ekestiĝante senpere el la Etruskaj migradoj), el la tumultado de la migrado de nacioj formiĝis mezepoka imperio de Germanujo... El la pilgrimado de Araboj formiĝis en Hispanio (do ne en gepatra lando) laŭ ĉiuj vidmanieroj plej signifa araba regno, kaj pli poste la hispana mondimperio. La iradoj de Normanoj en Anglujon kaj Francujon en la 10. jarcento estis komenco de la grandeco de tiuj landoj. Tie, kie pro la germana antaŭenpuŝo dum la deka ĝis dekdua jar-

cento la rezultanta mikso kun la venkitaj Slavoj estis plej intensa, estiĝis la Prusoj. Kaj en Ruslando en jaroj ĉirkaŭ 1400 miksis sin Slavoj kun Mongoloj kaj de tiam tiu nacio daŭre supreniras.

Estas eble ke ne ĉiam efikas ekskluzive la mikrado, sed verŝajne ankaŭ vekigo de dormantaj energioj, sed ĉial jam tiu ĉi mallonga idearo kontraŭstaras la tezon, ke la pli antikvaj rasoj estus iel pli talentitaj.

Kaj al kiu ŝajnas tiuj malnovaj historioj tro malproksimaj, tiu bezonas sole rigardi la senekzemplan evoluon de Ameriko, kie kreiĝas antaŭ niaj okuloj nova vivoplena nacio el certe poparte malpli valoraj forfalitajoj de eŭropaj nacioj kun malgranda sed certe ne malatentebla parto de negra kaj indiana sangoj. La nacion, kiun oni ne senrajte povas nomi nova mondo.

Ĉial oni devas tute objektive aserti, ke la prefero de la pura raso antaŭ la mikrita estas nenial pruvita nek versimila.

Koncerne diferencadon de la rasoj, estas maloportune, ke oni ne posedas ian kriterion por difini rason. Tial oni uzis ĉion eblan, oni provis diferenci inter homoj laŭ historiaj esploroj, oni uzis lingvajn similaĵojn kaj aliajn kulturajn similaĵojn kaj diferencaĵojn, oni finfine provis difini rasojn bazante sur korpaj kvalitoj. Ĉion kun ia argumento kaj ankaŭ kun ŝajna sukceso, se ni bazas sole unuflanke sur respektiva specialesplorado. Sed la naciaj grupoj starigitaj laŭ tiaj diversaj manieroj bedaŭrinde ne koincidas reciproke.

Ekzistas nacioj historie konfirmitaj, ekzemple la germanoj dum la migrado de nacioj, kies posteulojn oni povus serĉi en Italio kaj Afriko, en Hispanio kaj Bizanco.

Ekzistas lingvaj komunoj kiel ekzemple „Germanoj“, al kiuj krom la Germanoj apartenas ankaŭ Slavoj kaj Keltoj, ja eĉ Negroj kaj Mongoloj.

Fine ekzistas antropologiaj rasoj kiel ekz. longkapa norda tipo de eŭropanoj, kiu loĝas precipe ĉirkaŭ la Orienta kaj Norda maroj (escepte Pommern, okcidenta Prusio kaj Firlando).

Kaj ĉar nun neniu scias, kiu metodo estas decida, povas ĉiu trovi ion taŭgan por sia speciala deziro kaj (kio estas multe pli malbona kaj kondukas al senfina trompiĝo) ĉiu, kiu sur bazo de unuflankaj signoj limiĝis „nacion“, provas ankaŭ aliajn ĝiajn signojn konformigi al sia limigo. Tiamaniere oni volis trovi en la tuta areo, kiu estis iam skuata de migrado de nacioj, elpensitajn komunajn

artefaritajn signojn, oni volis rigardi germanan aŭ slavan lingvan teritorion kiel rason kaj oni volis rigardi judojn kaj Germanojn kiel kulturan komunon.

Antaŭ ĉio oni malbonuzadis la historion esploradon por starigi sensencajn postulojn.

Sed nune estas la historia esploro por la rasa problemo tute sensignifa, ĉar se en ia teritorio loĝata de milionoj restis aŭ enmigris unusola reprezentanto de fremda raso kaj tiu ĉi unusola posedas „superantajn“ speciajn signojn (tio estas tiajn ecojn, kiuj per miksaĵo kun la reprezentantoj de alia raso estas senescepte heredataj) tiam per sekvanta miksaĵo la tuta loĝantaro posedus post nemultaj jarcentoj tiujn ĉi signojn de la unusolulo.

Por tion kompreni oni devas pripensi ke (supozante 4 infanojn) unu homo havas en 5. generacio (do post 125 jaroj) unu milion da posteuloj; post 250 jaroj ili estas unu miliono, kaj post 375 jaroj respondas nombro de ĝia posteularo proksimume al nombro de ĉiuj vivantaj homoj. Do la historia fakto, ke iu nacio dum iu metita tempospaco estis purrasa kaj ne akceptis dum tiu tempo ian gravan aldonon de fremda sango, havas relative malgravan signifon.

Tiel ankaŭ la lingva esploro kondukis nenien ĉar ni scias, ke nacioj akceptas dum cirkonstancoj novan lingvon en tute mallonga epoko, tiel ekz. parolas la Slavoj en la orientelbeaj provincoj preskaŭ ĉie tute bone germane. La origine turko-tataraj Bulgaroj estis tiom trapanetritaj per la slavaj kulturo kaj lingvo, ke ili perdis ĉian konscion pri sia deveno; kontraŭe la Slavoj envenintaj Grekujon estas tute helenigitaj.

Ankaŭ la Gotoj en Hispanio kaj Lombardio forgesis baldaŭ kaj senreste sian germanecon. Tiam liston oni povus laŭvole daŭrigi. La saman rapidan ŝanĝeblecon montras ankaŭ ĉiuj aliaj kulturaj aranĝoj sed en pli alta grado.

Studo de korpaj signoj, kiu servas ĉe la bestoj preskaŭ ekskluzive por diferencigo de specoj, estas ankaŭ ĉe la homo la unusola, kiu donas uzeblajn rezultojn, kaj ĝi ankaŭ bone taŭgis por diferencigo de la grandaj homaj rasoj: blanka, nigra, flava kaj ruĝa. Por diferencigi la malgrandajn eŭropajn subvarietojn, kiujn oni ofte nomas ankaŭ rasoj, ĝi principe malsukcesis. Ĉar:

1. tiuj nacioj neniam estis efektivaj varietoj, ili havis nenian okazon evoluigi tiel, ĉar ili nur en tempo relative malfrua eligis sin el

la komuna trunko de la tiel nomita indogermana raso,

2. la studado estas esence malfaciligata, ĉar oni ne scias, ĉu la en Eŭropo estanta praraso, en kiun la enmigrintoj puŝis, estis homogena aŭ ne. Precipe tiun demandon respondados sukcesive pli bona kono de la antaŭhistoriaj trovaĵoj,

3. kaj tio estas la ĉefpunkto: dum la historia epoko estis la miksaĵo tiom intensa, ke oni devus atendi sole la disfalon de la nacioj.

Romanaj legioj premis sin al Pontuso kaj Ultima Thule kaj malproksimen trans la Limon kaj, kio estas pli, ili koloniigis grandan amplekson; tion ekz. atestas la entute romanaj nomoj de la rejnaj urboj kaj romanaj profiloj de la rejnaj knabinoj.

Poste saltis ankoraŭ antaŭ la migrado de nacioj kimbraj hordoj malproksimen en sudon, sekvis tempo, dum kiu la Germanoj kiel romanaj soldatoj trairadis la mondon, ĝis kiam ili dum la migrado de la nacioj trairis la tutan Eŭropon kiel memstaraj nacioj. Kaj tiuj ĉi migradoj de nacioj ne ĉesis precipe en orienta centra Eŭropo inter 15-a kaj 30-a gradoj longitudaj. Proksimume en Balkano kaj en la sur ĝi konstruita kvarangulo (kun pintoj en Stettin, Trieste, Leningrad, Konstantinoplo) okazis ankoraŭ rimarkinde pli malfrue migradoj de nacioj, kiujn atestas kurlandaj kaj transsilvaniaj Germanoj en teritorio slava kaj rumana, szekleraj Magiaroj en turka, Vendoj kaj Ĉeĥoj en germana teritorioj.

Sed ankaŭ alimaniere alportis milito kaj paco multan ŝanĝadon. Precipe en Germanujo preskaŭ ĉiuj eŭropaj nacioj inkluzive ne sole Finoj kaj Magiaroj sed ankaŭ Mongoloj kaj Moreskoj batalis reciproke. Sed multaj inter ili, precipe Hispanoj kaj Francoj, Svedoj kaj Poloj kuŝis ofte longan tempon en Germanujo, kontraŭe germanaj kaj svisaj militdungitoj garnizonis en la tuta mondo kaj produktis kun aŭ sen perforto posteulojn.

Al tiuj malfacilaĵoj elirantaj el la historio aliĝas plua malfacilaĵo el la biologio. Ekzemple la esplorado pri kranioj estas en si mem tute ekzakta metodo, ni sole ne scias, ĉu kaj kial la kraniaj signoj (tute simile kiel la aliaj korpaj signoj) estas varieblaj. Se ekzemple, kiel oni povas facile pruvi per kraniaj trovaĵoj kaj per statistiko, la ovaleco de kapo, respektive la bruneta tipo, kontinue plimultiĝas, aŭ se en Ameriko inter la Blankuloj plioftiĝas certa indiantipo, do ni ne scias, almenaŭ ni ne povas vidi tion sur la

kranioj, ĉu tion kaŭzas ia komence en malplimulto ekzistinta parto de la nacio kun superantaj signoj, kiuj nun „ekaperas“, aŭ ĉu tio estas akomodigo al la medio laŭ ĝiaj al ni ankoraŭ nekonataj kondiĉoj, aŭ ĉu tio bazas tamen sur enmigrado.

Memorante tiujn malfacilecojn oni povas diri, ke, se etnologio volus pruvi rasan purecon de iu nacio, la rezultato estus fina pruvo de netaŭgeco de ĝiaj tiurilataj metodoj. Sed moderna esplorado efektive ĉesis tion tendenci. Kaj dum pli frue la plej multaj nacioj estis tre fieraj je sia pura origino (derivante ĝin de ia dio, duondio au almenaŭ heroo), hodiaŭ sole Rusoj kaj Germanoj akcentas pasie sian raspurecon, aŭ pli bone dirite, ĉe ambaŭ nacioj tro serioze traktataj limigitaj partoj de ili, la panslavistoj kaj la ĉiogermanoj kaj iliaj sciencaj antaŭbatalantoj.

Por la Rusoj tio ankaŭ ne estas plene ĝusta sed ĉar ili simile al Skandinavo restis en sia orienta fermiteco sufiĉe netuŝitaj, restis efektive en Skandinavio la eŭropa nordtipo (Germanoj) kaj en Ruslando la eŭropa orienttipo plej sendifektaj.

Tradukis S. K.

melhundo = jezevĉik, rapidhundo = chrt, ŝpico = ŝpicl, halthundo = stavĉi pes, dogo = doga, mopso = mopsl, sanktbernarda hundo = bernardŭn, finbredita = vypĉstovanŭ, civilizbestoj = civilizacni zvifata, bredisto = chovatĉl (zvifrat), komuno = spolecĉstvŭl, varieto = odrŭda, varietata, romanaj soldatoj = řimŝtŭl vojŭci, superanta = pŕevlŭdajŭci.

Rádce českého esperantisty jest titul 37str. broŭrky, která v 86 otŭzkŭch a odpovĉdŭch obsahuje informace o espu, jeho praktickĉm upotřebenŭl, literatŭre, orgŭnizacŭl, sjezdĉch atd. Vydalo Sdruŭenŭl pŕŭtel esperanta, Praha II.-2032. Za 5.60 poŝtou.

Kantareto je sbŭrka 18 nŭboŭnŭch a 46 svĉtŭskŭch pŭsnŭl ĉs. v esp. pŕekladu Jana Filipa, prof. Mil. Lukŭŝe, Dra C. Parmy a j. Vydal Fr. Buhr, Břevnov 514. Za 5.60 poŝtou.

Velkŭ slovnŭk esperantsko-ĉeskŭ sestavil Jan Filip a vydŭ ĉasopis „Novŭ nŭrod“ v Pŕerovĉ, Masarykovo nŭm. 16, kdeŭ moŭno subskribovatŭ za 24 Kĉ.

Originala verkaro de Dro L. L. Zamenhof je skvoŝnĉ vŭzanŭ kniha o 605 str., která obsahuje souhrn pojednŭnŭl, řeĉŭl, dopŭsŭl, ĉasopiseckŭch ĉlŭnkŭl, pŕedmluv, bŭsnŭl autora esperanta. Vydala fma F. Hirt & Sohn v Lipsku, se 6 faksimilĉm a portrĉtem dra Z. Cena 120 Kĉ. Moŭno platŭtŭ sloŭenkou, vŭŭadanou u Progresu. — Vhodnĉ za dar novoroĉnŭl pŕŭtelŭm esperantŭstŭm.

Tiuj, kiuj skeptike parolas pri la malfacilaĵoj dum la reorganizado de la nova centra Eŭropo, devus ekpensi, ke la Habsburga monarkio havis tri jarcentojn por efektiviĝi tiun reorganizon kaj ĝi ne sukcesis tion fari. Ni ne postulas tri jarcentojn, sed sole periodon de unu generacio, kiel Moseo gvidinta dum kvardek jaroj sian popolon antaŭ ol li ĝin, refreŝigitan kaj repurigitan el la egipta sklaveco, enkondukis en la landon promesitan. Ĉeĥoslovakio havas multe da amikoj, sed ankaŭ da malamikoj, por kiuj la nova ordo en la centra Eŭropo ne estas laŭ ilia gusto, kaj tiuj faras ĉion eblan, por malfaciligigi al Ĉeĥoslovakio ĝian taskon. Ĉeĥoslovakio estas decidinta montri sin inda de la fido, kiun metas en ĝin la civilizita mondo. Ĉi havas por tio sufiĉe da forto kaj ankaŭ da volo.

